AŬSTRIA

ESPERANTO-REVUO

Oficiala organo de la aŭstria Esperanto-movado

Offizielles Organ der österreichischen Esperanto-Bewegung

Aperas monate

Redakcio kaj administracio: Vieno XV, Fünfhausgasse 16, Austrio. — Telefono R 33-3-64

8-a jaro FEBRUARO 1953 n-ro 2

A L V O K O

je kontribuo por aĉeto de bonkvalita

P R E S I L O

La nova Esperanto - Centro posedas propran ejon por presado kaj multobligado . Bedaurinde mankas taúga aparato, per kiu oni povas produkti konvenajn informilojn, instruilojn, varbilojn, eĉ revuetojn.

Per akiro de tia aparato al la Esperanto - Centro ebligus, ŝpare kaj sendepende de negoca presejo eldoni tiajn Esperantaĵojn, kio multege helpus al la progresigo de la Internacia Lingvo en nia lando.

Aparato tia tial estus kvazaú "viva monumento de Esperanto",kiu plu produktus kaj diskonigus la ideon de d-ro Zamenhof en ĉiuj direktoj tra nia lando.

Pro tio la estraro de AEF decidis, alvoki Esperantistojn kaj emikojn de Esperanto al k o n t r i b u o por aceto de bonkvalita presilo! Ni kalkulu pri prezo de 8ooo - 1o.ooo S. Se ĉiu aústria samideano, kiu nun estas organizita en nia federacio, donacos S 1o.-- kaj laúeble kelkaj plimulte, ni certe povos baldaú disponi pri tiu valora aparato , kiu garantios la multobligadon de nia varba agado kaj eĉ ŝparigos al ni kostojn por la eldonado de nia Aústria Esperanto - Revuo. Do, karaj gesamideanoj, senprokraste sendu vian kontribuon kaj kolektu monon por tiu bona afero! Ni raportos konstante en AER!

L a k o m p a r o

Se sonus en konkursa rondo
Al mi laúvice tie ĉie
La lingvoj de la tuta mondo,
La glorpremion donus mi
Al Esperanto sen hezito
Kun mia plenkonvinka pled'.
Havigu lokon laú merito
Al tiu sorĉa florbuked'.

En Esperanto belkompone
Kuniĝis per mirinda art'
El ĉefaj lingvoj pleje bone
Konataj la plej plaĉa part'.
De la latina jen la fundo,
De la itala la belson'
Kaj ĉarmaj vortoj en abundo,
De l'franca ege multa bon'.

De l'angla jen la artikola
Simpleco sen cerbum-turment'
Kaj kara dono de la pola:
La reguleco de l'akcent'.
Jen mia amo kaj fiero
Jam ofte min ravinta tre:
Germana vort-kunmet-libero
Por ĉiam nova vorto-kre'.

Kaj tiel plue, tiel plie.
Jes,mi ripetas kun plezur',
Ke Esperanto prenis ĉie
De ĉio la plej bonan nur.
Al ĝi do ĉie lokon donu
Kaj helpu ankaú vi, ke ĝi,
Feliĉon alportante, sonu
De kor' al koro pli kaj pli.

Karl Vanselow.

ESPERANTO-HILFE FÜR HOLLAND.

Der Ö.E.V. ruft alle österr.Esperantisten auf zur Linderung der Not, die unsere holländischen Freunde durch die furchtbare Naturkatastrophe getroffen hat, in Gedenken an die holländische Hilfe für Österreich eine SOFORT-SPENDE zu leisten, die wir umgehend dem Niederländischen Esperanto Verband zuleiten werden.

Einzahlungen erbitten wir auf das Postsparkassen-Konto Nro 183.874 (Österr.Esperantisten Verband) für Holland-Hilfe !

Der Vorstand des Ö. E. V.

A l l a m e m b r o j d e A E F !

La membraro de AEF nuntempe nombras ne pli multe ol ĉirkaú 7oo personojn. Tio nur estas triono de la plej al-

ta membrostato ekde 1945. Sciante, ke nur sufiĉe forta organizo povas plenumi siajn taskojn, kaj konvinkite, ke devas esti eble, reakiri minimume la jam akiritan staton, la estraro alvokas la aústriajn geesperantistojn por ke ili energie kunhelpu,kiel unuan etapon al plua progreso, duobligi dum la jaro 1953 la membronombron de AEF.

Tial devas esti LA TASKO DE LA JARO 1953, ke ĉiu Esperantisto varbu minimume unu personon por la lernado de Esperanto, kiu ĝu membro de nia federacio.

Krom tio bonvolu PER PERSONA KONTAKTO reaktivigi la eksajn membrojn, kiuj pro iuj ajn kaúzoj forlasis nian movadon. Ne konsideru tiun kampanjon senŝanca,sed konsciu ke lerteco kaj persistemo rikoltigos al vi sukcesojn!

Specialan atenton ni ankaú volas veki por la temo "Esperanto en la familion!",ĉar ni spertis,ke ĉie, kie kelkaj familianoj estas adeptoj de Esperanto,ties restado en la movado estas pli forte garantiata.

La estraro de AEF esperas kaj atendas,ke tiu ĉi voko ne forflugos neatentote, sed ke ĉiuj AEF - land-kaj grup-estraroj same kiel ĉiuj aktivuloj de nia movado kompremos la gravecon de tiu ĉi alvoko kaj tuj ekagos kaj agados cel-konscie.

Informu la E-Centron pri viaj rezultoj,AER daúre raportos pri ili.

A g a d o 1 9 5 3

Konsciante, ke nur agado laúplana fine kondukos al celo, kaj konstantante, ke estas pli bone,intense prepari kelkajn agojn, ol disigi kaj per tio senvalorigi la fortojn en diversaj pli-malpli hazardaj aferoj,la estraro de AEF decidis, rekomendi al la membroj, koncentrigi siajn fortojn al jenaj programeroj:

1) Zamenhof-memortago okaze de la datreveno de l'morto de la Majstro;
2) partopreno al la Aústria Esperanto-Kongreso en Klagenfurt;
3) aranĝo de varbsemajno en aútuno(septembro-oktobro);
4) varbado por kursoj de la vintra sezono 53 / 54;
5) Zamenhoffesto kaj "Tago de la Esperanto-libro" en decembro.

Necesas jam nun - komence de la jaro - eklabori por kontentiga preparado de ĉiuj kvin aranĝoj.

La estraro de AEF tial petas la AEF-land- kaj grup - estrarojn, tuj okupi sin en siaj kunsidoj pri sukcesplena efektivigo.

La estraro de AEF.

INFORMOJ DE LA ESPERANTO-CENTRO

S-ano Ministerialrat d-ro Maximilian Führing 60 jara. Antaú nelonge nia 1-a vicprezidanto festis sian 60an naskiĝtagon. La AEF-estraro esprimas al li nome de la tuta aústria Esperantistaro korajn, samideanajn bondezirojn. Ĝi uzas tiun okazon ankaú por esprimi al li la sinceran dankon de la aústria samideanaro pro liaj klopodoj por niaj movado kaj federacio, speciale pro la restarigo de la "Ŝtata Esperanto-Ekzamen-Komisiono".

La publika administracio por la aústria radio, Radio Wien (RAVAG), la 2.1.53 letere dankis al la E-Centro pro informoj pri la sendricevoj, sciigitaj al AEF de eksterlandaj Esperantistoj.

38a Universala Kongreso de Esperanto: Ĝis manuskriptigo de tiu ĉi n-ro de AER estis anoncitaj por la Zagreba UK en la E-Centro 32 aústriaj ges-anoj. Pluaj partoprenontoj anoncu sin baldaúege ! Anoncojn akceptas kaj informojn donas la E-Centro! Kotizoj nunaj (ĝis 31.3.53): S 154.- edz (in) o S 77.-, junul(in)o, ne pli ol 20jara: S 53.-; la UEA-anoj ĝuas rabaton de S 18.-, resp. 9.-. Aperos baldaú E-prospekto kun ĉiuj detaloj. Hotelprezoj reduktiĝis ĝis triono. Magistrato de Zagreb decidis, doni al strato la nomon "Esperanto - strato". Antaúkongreso en Klagenfurt, postkongreso en Ljubljana kun ekskursoj al la sloveniaj montaj kaj groto Postojna (Adelsberg). Statistiko: 31.12. 52 = 458 aliĝintoj el 22 landoj. Lasta informo: La registaro de la kroatia respubliko asignis al la LKK la sumegon de 500.000 dinaroj ! (Aldone: la kongreso okazos de 25.7. ĝis 1.8.52).

UNESKO okupos sin serioze pri nia lingvo! Tiun ĝojigan informon ni ĉerpas el " Heroldo de Esperanto " 1/53 : "Tio ne signifas, ke en tuja estonteco nia ideo estos venkinta, kaj ke ni jam povus rezigni la laboron por nia afero. Tiel rapide niaj fruktoj ne maturiĝas. Sed ĝi signifas unu plian paŝon sur la vojo al la venko, eĉ paŝon gravan. La Esperantistaro povas gratuli sin pro ĉi tiu ĝojiga informo en la komenco de la jaro. Ĝi estas bona omeno."

La 3.12.52 laborgrupo de la programkomisiono UNESKO

akceptis la jenan rezolucion, prezentitan de la svisa delegacio. En tiu laborgrupo estis reprezentantoj de ĉirkaŭ 20 landoj, inkluzive de la plej grandaj. La akcepto estis unuanima. Jen estas la Esperanta traduko de la oficiala teksto:

"La Ĝenerala Konferenco de UNESKO, konsiderante, a) ke internacia Petskribo favore al Esperanto, subskribita de 492 organizaĵoj kun entute 15,454.780 membroj, kaj de 895.432 individuaj personoj, estis prezentita al la Unuiĝintaj Nacioj kaj transdonita fare de la Sekretariaro de tiu ĉi organizajo al la Sekreatriaro de UNESKO,
b) ke UNESKO havas bonajn kaŭzojn, atenti la rezultojn atingitajn per Esperanto por la evoluigo de la intelektajrilatoj kaj interkompreniĝo inter la popoloj,
invitas la ĝeneralan Direktoron, komuniki la Petskribon al la ŝtatoj-membroj kaj entrepreni, kiel parton de la normalaj aktivecoj de la Sekretariaro, la necesajn preparlaborojn, por ebligi al la Ĝenerala Konferenco, decidi ĉu m sia Oka Kunveno pri la agoj, farotaj je tiu ĉi Petskribo".

Esperanto ĉe Radio-Romo. Sekcio "Esperanto-Voĉo" de Radio-Romo informas, ke dissendoj en la Internacia Lingvo okazas regule merkredon kaj vendredon de 19-19.20 h per mallongondoj 25.31, 31,35 kaj 49.92 m. Aŭskultinte, skribu al Radio-Roma, Via Veneto 56, Italio.

Esperanto-aktivado en Wattens, Tirolo. S-ano Otto Steiner pasintjahre gvidis kurson kun 7 membroj; nun por 2 personoj en sia loĝejo. Kune kun grupo en Innsbruck estis farataj tri ekskursoj al Tulfererhütte, Reintalersee kaj Kanisiusbründl ce Rum. La Zamenhoffeston la grupo partoprenis en Innsbruck.

Mendu la novan verkon "Esperanto, Mittler der Weltliteratur" de W. Th. Oeste, eldonita de Siegfried Ziegler Verlag, München, ricevebla je la prezo de S 26.-- per "TRAMONDO", E-Centro. La verko prezentas koncizan super - rigardon pri la strukturo de la Internacia Lingvo kaj pruvas en konvinka, detalema maniero, ke Esperanto estas samranga al la naciaj lingvoj. La ĉefparto de la libro estas dediĉita al poezitradukoj el 7 lingvoj. La aldon - ita, laŭvorta traduko en la germana lingvo montras, kiel sukcese Espernato sin konformigas al la originalaj lingvoj. La libro plaĉos al ĉiu, kiu emas penetri en la li - teraturan esencon de nia lingvo. Cetere gi provizas la ba

talanton por Esperanto per trafaj argumentoj, ĉerpeblaj el sagaca analizado de la temo. La iom tro vastema tabelo de ekzemploj pri vortformado kaj kelkaj neologismoj ne estos laú ĉi-es gusto. Tamen tre rekomendinda verko. H.K.

Hofrat H u g o S t e i n e r 75-jara.

Naskita la 26.2.1878 en Retz, Aústrio, kiel filo de komercisto, li studis Komercan Akademion kaj venis kiel oficisto al la aústriaj fervojoj, kiun okupon li forlasis en 1923 por sin tute dediĉi al Esperanto.

En la jaro 1911 kolego en la fervojdirekcio donacis al li ŝlosilon de Esperanto kaj Steiner tuj entuziasmiĝis pri la internacia lingvo. Jam samjare li frekventis kurson ĉe Julius Glück kaj 1912 li jam vizitis la XIIan Universalan Kongreson de Esperanto, dum kiu li per siaj geamikoj Sergeant el Boulogne sur Mer, kiuj estis amikaj al d - ro Zamenhof, estis prezentata al la Majstro kaj havis la raran distingon, povi sidi kun li kaj lia edzino tutan semajnon ĉe la komuna tablo por tagmanĝi.Tie li ĵuris al si, labori por la bono de Esperanto. En la jaro 1924 li estis elektata ĝeneralsekretario kaj 1925 prezidanto de Aústria Esperanto-Asocio, kiun li gvidis ĝis 1937. En la jaro 1938, fatala por tuta Aústrio, nazi-Gestapo pro lia sintenado kaj fondo de la Internacia Esperanto-Muzeo arestis lin, restigis lin dum tri monatoj mallibera kaj nur al bonŝanca hazardo li dankas, ke li ne venis en koncentrejon.

Markŝtono de lia agado estis la jaro 1927. Li tiam fondis la Internacian Esperanto-Muzeon en Vieno, kies estontecon li en la posta jaro certigis per kontrakto kun la Aústria Ministerio por Edukado. Per ĝi la muzeo fariĝis "speciala kolekto"en la kadro de la mondfama Aústria Nacia Bibkioteko por eternaj tempoj. La Ŝtato disponigis (1945) pri kvin salonegoj en la estinta imperiestra kastelo "Hofburg" en Vieno, bindigis la librojn, zorgas por hejtado, lumigado ktp. kaj krome nun donas ĉiujare subvencion por ebligi modestan kompensadon al la laborantoj en la muzeo.

1934 samideano Steiner aranĝis la Internacian Konferencon "Esperanto en la lernejon kaj praktikon" kaj, pro siaj meritoj sur la kampo de Esperanto en Aústrio ricevinte la titolon "Hofrat", li dum 1936 dediĉis sin al la

organizado de la XXVIII-a Universala Kongreso de Esperanto en Vieno, kiun li ankaŭ prezidis kaj en kies kadro estis prezentata la opereto "La blanka cevaleto".

Samideano Steiner ne senenergiiĝas. 73jarulo, en la Ronda Salonego de la muzeo li instalis memorlokon por la pioniroj de la Esperanto.movado,"Panteonon",kaj 1952 estis inaugurata en la muzeo "Konstanta Ekspozicio",kiu montradas 7oo libroj n,ordigitajn laŭ la specialfakoj,al kiuj ili rilatas,kaj inter ili la unuajn eldonaĵojn en Esperanto.

En la jaro 1951 Hofrat Steiner havis preskaŭ mortigan akcidenton. Jam post kelkaj tagoj en la malsanuleja lito li eklaboris por nia komuna afero, helpante al sia samnomulo Hans Steiner,Wörgl,por ties klopodoj pri la starigo de la unua Zamenhof-monumento en Aústrio. Gardate de sia edzino kaj kun bastono la junule energia pioniro de la aústria Esperanto-movado reiris en sian muzeon,per kiu li al Aústrio speciale kaj al la tuta mondo donacis Zamenhof-monumenton unikan,kaj laborege sin donis al novaj taskoj. Laste ni eksciis, ke li ekverkas katalogon de la muzeo.-

Ĉi-ĉio,kion ni revue prezentis,estas nur kelkaj,elstaraj viveroj el vivo, plenigita per disĉipleco al la Majstro. Ekzistas malmultaj homoj,kies pensoj dum pli ol kvar jardekoj tiel intense kaj fidele rotaciis ĉirkaŭ la penso de Zamenhof kaj kreis verkon,kia estas la lia,tiel eminente grava por movado kaj historio de Esperanto.

Ni uzu la venon de lia 75a naskiĝtago por gratuli kaj danki al li.

Ankoraŭ multjaran prosperan agadon en junulaj freŝeco kaj saneco!

LA ESTRARO DE AEF

Edmund Finke:

La tri predikoj.

Kiam Abu Keib, la turka "Till Eulenspiegel", en malfrua aĝo estis laciĝinta je siaj petolaĵoj, li igis sin elekti imamo (moskeestro, predikisto) de Uzumköpri, kio pro la famo de lia gaja saĝeco-kial saĝeco ne estu gaja? ne estis malfacile.

Kiam Abu Keib la unuan fojon en la moskeo ĉe la bordo de la rivero Ergene faris la diservon,li instigis la fidelulojn al preĝado kaj,leginte la unuan ĉapitron de l'ko-

rano, li volis komenci la predikon, Je lia grandega konsterniĝo li konstatis,ke en lia kapo estis timiga malpleno, kiun li nek povis superi,nek kapablis plenigi ĝin per sonantaj vortoj.

Se li ne povis esti imamo,li do volis resti Abu Keib Li do demandis:"Ĉu vi scias,fideluloj, kion mi intencas hodiaŭ prediki al vi?" - "Ne, sinjoro",respondis la piaj mahometanoj de Uzunköpri. - "Mi ankaŭ ne!"diris Abu Keib vigle kaj forlasis rapidpaŝe la moskeon.

La sekvintan vendredon,la tagon de Alaho, multa popolo kunvenis en la templo ĉe larivero. La fideluloj estis scivolaj,kiamaniere Abu Keib tiun ĉi fojon predikos la vorton de l'profeto.Leginte la duan ĉapitron de l'korano, li ree demandis:"Vi fideluloj,ĉu vi scias, kion hodiaŭ mi estas dironta?"

La mahometanoj de Uzunköpri rikanis senhonte: "Jes, honorinda imamo",ili malice vokis en ĥoro. - "Nu, se vi jam scias ĝin,mi ja ne bezonas diri ĝin al vi" diris Abu Keib kaj forlasis rapide la templon.

La trian vendredon la fideluloj estis kunvenintaj tiom amase,ke la malgranda moskeo ne povis enhavi iliajn vicojn kaj ili staris en la strato ĝis la bazaro.

Abu Keib faris la diservajn ceremoniojn kaj, alvokinte Alahon kaj la profeton kaj leginte la trian ĉapitron de l'korano, li denove demandis la fidelulojn, ĉu ili scias, kion li hodiaŭ intencas prediki.

"Ho Abu Keib,aúskultu nian respondon:unu parto scias ĝin, la alia ne."

"Nu, vi fideluloj de l'profeto,do tiuj,kiuj scias ĝin, diru ĝin al la aliuloj, kiuj ne scias ĝin."

Sed tiu estis la lasta prediko de Abu Keib, antaŭ kiam li kun sia malgranda,malobeema azeno formigris,por gajigi per siaj petolaĵoj ankaŭ aliajn regionojn de la regno.

Trad. -Gi-

Eigentümer und Herausgeber: Österr.Esperantistenverband.
Verlag: "Tramondo". - Verantwortlicher Redakteur: Hugo Kraus, sämtliche W i e n XV., Fünfhausgasse Nummer 16
Druck: Offset Vervielfältigung, ADRESSEN-SUPPAN Wien IV., Brucknerstrasse 2, U 41-2-7o